

La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache. Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof.

Kosto por $\frac{1}{2}$ jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 markoj 30 pfenigoj. (Por Rusujo — 1 rublo, por ĉiuj ceteraj landoj — 3 frankoj.) Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto (de ĉia lando), sed en tia okazo oni devas sendi per 20% pli multe ol la kosto nominala. Anoncoj po 1 marko por $\frac{1}{32}$ de la paĝo.

Ĉio tuŝanta la gazeton „La Esperantisto“ (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, pago por la abonado k. c.) devas esti sendata al L. Zamenhof. (Adreso: Dr. L. Zamenhof à Varsovie, Russie).

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nurnbergo.

No. 12.

Nurnbergo, Decembro 1890.

Jaro 1.

Al niaj abonantoj.

Kun la nuna numero finiĝas la unua jaro de eldonado de nia gazeto. Ne facila estis por ni tiu ĉi jaro: diversaj cirkonstancoj ne lasis nin labori tiel, kiel ni volis: sed nun ĉiuj malhelpoj estas jam forigitaj. nia afero iras denove regule kaj bone kaj kun trankvila animo ni povas nun rigardi en la estontecon. Ni ĉiam senlace laborados por nia afero kaj ni ne dubas, ke ankaŭ ĉiujn amikojn de nia afero ni ĉiam fidele trovos sub nia standardo.

Al tiuj niaj abonantoj, kiuj pagis por unu jaro, ni permesas al ni memorigi, ke ilia tempo de abonado finiĝis kun tiu ĉi numero kaj ni atendas de ilia flanko novan abonon. De Januaro 1891 ni akceptados abonon nur por tuta jaro kaj tial la abonantoj, kies tempo de abonado nun finiĝis, faros la plej bone, se ili sendos nun la abonon pagon ĝis la fino de l' jaro 1891 (4 markoj 60 pfenigoj aŭ 2 rubloj). Tiu ĉi maniero estos la plej oportuna ne sole por ni, sed ankaŭ por niaj abonantoj. La abonantojn, kiuj, ne sciante ankoraŭ pri la nova ordo, sendis jam la pagon pli ol ĝis Januaro 1891, t. e. ekzemple ĝis Aprilo, Julio aŭ Oktobro, ni petas, ke ili alsendu ankoraŭ la mankantan pagon ĝis la fino de 1891, por ke ni povu de nun ĉiam kalkulasi de Januaro ĝis Januaro, ne devante konduki kalkulojn kun tre malgrandaj sumetoj por ĉiu kvaronjaro aparte.

Al tiu ĉi numero estas aldonita, kiel aparta folieto, la nomaro de ĉiuj abonantoj, kiuj pagis al ni por la kvara $\frac{1}{4}$ jaro (No. 10, 11 kaj 12).

Pri la Ligo.

Apenaŭ en la No. 3 montriĝis mia invito fondi Ligon, mi komencis ricevadi de multaj flankoj avertojn kontraŭ tiu ĉi paŝo. Sinjoroj Einstein, Grabowski, de Wahl, de Majnov, Geoghegan, sinjorino Olga L. kaj multaj aliaj penis deturni min de la fondado de Ligo, memorigis al mi la malfeliĉan sperton de la Akademio Volapŭka kaj la danĝeron, kiun la multkapeco alportus al nia juna afero. „La paca natura vojo“, ili skribis, „laŭ kiu nia afero iris ĝis hodiaŭ, estas la plej bona, kaj oni ne devas riski novaĵon, se la malnovaĵo estas bona“... „La „Esperantisto“ estas nia plej bona Ligo; ĝi kolektas ĉirkaŭ si ĉiujn amikojn de nia afero, ĝi montras al ili, kion fari kaj ĝi ligas inter si iliajn apartajn fortojn al unu forto multe pli bone ol ĉiuj paragrafoj“... „Libere kunigitaj per la centra organo, sendependaj unuj de la aliaj, ni prezentos militistaron multe pli ordan ol ĉia Ligo, kaj tiu ĉi militistaro estos paca interne kaj paca ekstere kaj permesita

en ĉiu lando, dum Ligo oficiala renkontos malfacilaĵojn en kelkaj landoj, enkondukos nian aferon kredeble en suspekton ĉe la registaroj kaj baldaŭ kelkaj tre gravaj landoj estos absolute fermitaj por nia laborado“... „La sola rezultato de la „Ligo“ estos, ke ĝi ligos al ni mem la manojn“... k. e. k. e. Mi sentis jam mem, ke mi faras paŝon iom danĝeran kaj eble submetas propramane dinamiton sub nia tuta konstruo. Tamen malgraŭ la avertoj mi estis ankoraŭ tro optimista kaj mi pensis, ke transdonante la sorton de nia afero al Ligo ni fermus la buŝon al tiuj, kiuj pensas, ke ili ĉion farus pli bone, ni donus per tio ĉi forton al nia afero, gardante ĝin samtempe per bone pripensita kaj ĉion antaŭvidanta Regularo de ĉiu danĝero. Sed bedaŭrinde la sperto baldaŭ montris tute alion. Apenaŭ la Regularo estis presita, en nia afero, ĝis nun tiel paca kaj regula, tuj komenciĝis malkompreniĝoj, disputoj kaj malagrablajoj — ne sole post la preso de la Regularo, sed ankoraŭ en la tempo de la presado mem. Jam la presado mem estis ligita kun craroj kaj malkompreniĝoj, kiuj devigis perdi multan tempon kaj laboron por klarigado kaj rebonigado kaj lasis post si nebonan impreson. Ne estis ankoraŭ kreitaj la oficoj administraj, kaj jam multaj volis esti administrantoj: nenio estis ankoraŭ farita, kaj jam multaj estas malkontentaj aŭ ofendiĝis, ke oni forgesis pri ili en la Ligo; la kazo de la Ligo estas ankoraŭ malplena, kaj jam kelkaj timas, ke la mono publika estos perdita aŭ ne bone uzita. Finon al tiuj ĉi malagrablajoj ni eĉ ne povas antaŭvidi, ĉar kun ĉiu paŝo kredeble kreskos la nombro de la malkontentuloj.

Tiel en mallonga tempo malutilon, malagrablajojn kaj danĝeron la Ligo alportis al ni jam en sufiĉa grado. Nun estas la demando, kion bonan alportis la Ligo? Ĉu ĝia utilo kovris aŭ promesas iam kovri ĝian malutilon? La sperto bedaŭrinde respondas al ni: „Ne, la utilo de la Ligo ne kovris eĉ centan parton de ĝia malutilo“. Ni atendis, ke la Ligo plaĉos al niaj amikoj, ke la voko de la Ligo, aŭdita per unu fojo en ĉiuj urboj kaj urbetoj, kie loĝas niaj amikoj, elkreskiĝos en la daŭro de kelkaj monatoj multajn klubojn kaj de ĉiuj flankoj al la kazo de la Ligo venos riĉaj sumoj, kiuj donos al nia afero forton multe pli grandan ol ĝi havis ĝis hodiaŭ. Sed kion ni vidas? La amikoj silentas; ekster la ofero de sinjoro T. (kiu sendis sian oferon al la bontrovo de la aŭtoro ankoraŭ antaŭ la fondo de l' Ligo kaj kiu sendus ĝin sekve ankaŭ sen la ekzistado de la Ligo), la sumo de ĉiuj alsenditaj oferoj ne sole ne pligrandiĝis, sed ĝi prezentas absolute nulan en komparo kun la oferoj, kiuj estis alportitaj al nia afero ĝis nun.

Per unu vorto, kiel ajn malagrabla ĝi estas, ni devas konfesi, ke ŝajnas al ni, ke la „Ligo“ estas infano malvive

naskita. Ne estas ankoraŭ tempo diri ion difinitan pri la Ligo, nek pro, nek kontraŭ, kaj iam poste ni eble ankoraŭ revenos al tiu ĉi demando; sed nun ni devas ankoraŭ nin gardi fari ian paŝon decidan, antaŭ ol la demando estos bone pripensita kaj preparolita. Tiel la nuna stato de la demando estas:

1) La Ligo ankoraŭ ne ekzistas.

2) La Regularo donita en la No. 6 de la „Esperantisto“ estas nur projekto; ankaŭ mia propra Regularo, kies principojn mi supre klarigis, estas nur projekto.

3) La ordo en nia afero restas ankoraŭ en ĉio tute tiu sama, kiel ĝi estis antaŭ la propono en la No. 3 de nia gazeto.

4) La sumoj de mono, kiuj ĝis nun envenis en la provizoran kason de la Ligo, restas en la dispozo de la klubo Nurnberga, kiu povas ilin uzi por la celoj de nia afero laŭ sia propra bontrovo kaj sciigos per la „Esperantisto“ la manieron, en kiu ĝi ilin uzis.

5) Personoj, kiuj volas fari oferojn por nia afero, povas sendi sian monon laŭ sia propra plaĉo aŭ al L. Zamenhof, aŭ al Chr. Schmidt aŭ al iaj aliaj personoj, kiuj esprimis la deziron entrepreni ion por nia afero. La ricevantoj de oferoj donados en la „Esperantisto“ kalkulon pri la uzita mono.

6) La lingvo mem restas tute sendependa de ia persono aŭ institucio; ĝi estas komuna apartenaĵo de ĉiuj esperantistoj kaj progresas laŭ vojo natura, kiel ĉiuj aliaj lingvoj. La lingvo ne estas fermita kontraŭ novenkondukaĵoj; sed, kiel en ĉiu alia lingvo, la ennovaĵoj estas farataj sub la persona respondeco de iliaj aŭtoroj. Ĉiu nova formo estos nomata bona kaj regula nur tiam, kiam ĝi estos akceptita kaj uzata de la plejmulto de la skribantoj.

Tamen vidinte, ke kelkaj amikoj ne bone komprenas tiun ĉi sendependecon de la lingvo kaj liberecon de la stilo, mi uzas nun la okazon por diri pri ĝi kelkajn vortojn. El la cirkonstanco, ke mi unuforme korektas la stilon en ĉiuj artikoloj alsendataj por la „Esperantisto“, unu amiko konkludis, ke mi batalas kontraŭ la libereco de la stilo. Sed se li nur ĵetus rigardon sur tion, kio estas farata en ĉiuj aliaj lingvoj, kiuj ja tute certe estas sendependaj, li facile vidus, ke lia konkludo estas tute erara. Rilate la verkojn, kiujn la diversaj aŭtoroj eldonas sub sia propra respondeco kaj kostoj, mi neniam batalis kontraŭ ilia stilo, mi neniam protestis eĉ per unu vorto en la nomo de iaj rajtoj de aŭtoro. (Tiel ekzemple la diligentaj legantoj povis rimarki, ke en kelkaj elirintaj verkoj estas trovataj pecoj kun tia stilo, kiun aprobi ne povus ne sole mi, sed neniu en la mondo kaj eĉ la aŭtoroj mem, se ili atente tralegus sian verkon; tamen ĉu mi iam elparolis ian „veto“?) En siaj sendependaj verkoj la aŭtoroj povas ŝanĝi la stilon, kiom ili volas, uzi ne sole aliajn vortojn ol mi uzas, sed eĉ ŝanĝi la formojn gramatikajn — mi neniam protestos. Ĉu ilia stilo plaĉos aŭ ne plaĉos, ĉu iliaj verkoj estos legataj aŭ forĵetitaj kaj forgesitaj, ĉu iliaj ennovaĵoj estos akceptitaj — ĉio estas propra afero de la aŭtoroj mem. Sed en verkoj aŭ gazetoj, kiuj eliras sub mia morala respondeco, estas ja afero tute natura, se mi penas, ke la stilo estu tia, kiu estas bona en miaj okuloj. Oni povus eble trovi, ke ĉar mi la plej multe laboras, skribas kaj eldonas, mia voĉo estos la plej influa; sed laboru kaj eldonu Vi pli multe — kaj Via voĉo estos pli influa ol mia. Se mi ne pretendas je pli multe da rajtoj ol ĉiu alia esperantisto, oni ja certe ne povas postuli, ke mi havu pli malmulte ol ĉiu alia. Cetero, se mi eĉ mem volus esti tute senvoĉa — kion dirus miaj legantoj, se sub la redakcio de unu sama persono ili ricevus pecojn kun multkolora stilo?

Ni montris la nunan staton de nia afero, aŭ almenaŭ la punkton de vidado, sur kiu nun staros nia gazeto. Eble ni revenos ankoraŭ al tiu ĉi demando — se la legantoj ĝin deziras — aŭ per apartaj artikoloj, aŭ per respondoj al la amikoj.

La Rozeto.

De Göthe.

Knabo vidis — jen rozeto

Sur la kampo staras;

Bela, juna la floreto...

Vive kuras la knabeto,

Ĝojas, miras, flaras.

Sur la kampo la rozet'

Kiel infanet'.

Knabo diris: „mi eltiros

Belulinon mian“;

Floro diris: „vi foriros, —

Per pikiloj mi disŝiros

Tuj la manon vian“.

Sur la kampo la rozet'

Kiel infanet'.

La sovaĝa knab' ridante

La rozeton prenis,

La floreto batalante

Sin defendis pikadante,

Sed la sorto venis.

Sur la kampo la rozet'

Kiel infanet'.

L. Z-f.

La virineto de l' maro.

Fino.

La reĝidineto de l' maro fortiris la purpuran kurtenon antaŭ la tendo kaj vidis, kiel la bela fianĉino dormas, tenante sian kapon sur la brusto de l' reĝido, kaj ŝi kliniĝis, kiais lin sur la bela frunto, suprenrigardis al la ĉielo, kie la ruĝo de l' mateno ricevadis ĉiam pli brulantan koloron, ekrigardis la akran tranĉilon kaj direktis ree siajn okulojn sur la reĝidon, kiu en la sonĝo elparoladis la nomon de sia fianĉino, — ŝi sola vivis en liaj pensoj — kaj la tranĉilo tremis en la manoj de la virineto de l' maro, . . . sed jen ŝi ĵetis ĝin malproksime for en la ondojn, kiuj ruĝe eklumis, kie falis la tranĉilo; elrigardadis kiel se gutoj de sango ŝprucus supren el la akvo. Ankoraŭ unu fojon ŝi ekrigardis la reĝidon per rigardo duone estingita, ĵetis sin de la ŝipo en la maron kaj sentis, kiel ŝia korpo sin turnis en ŝaŭmon.

Nun la suno leviĝis el la maro, kviete kaj varme falis ĝiaj radioj sur la malvarman malvivan ŝaŭmon de l' maro kaj la reĝidineto de l' maro sentis nenion de la morto. Ŝi ekvidis la sunon kaj proksime super ŝi flugetis centoj da travideblaj belegaj estaĵoj; ŝi povus tra ili vidi la blankajn velojn de la ŝipo kaj la ruĝajn nubojn sur la ĉielo. Ilia voĉo estis kiel sonorado de sferoj, sed tiel spirita, ke nenia homa orelo povis ĝin aŭdi, kiel ankaŭ nenia tera okulo povis vidi tiujn ĉi ĉielajn estaĵojn. Senflugiloj ili sin portadis tra la aero danke sian propran facilecon. La virineto de l' maro vidis, ke ŝi havas korpon tian kiel ili, kiu ĉiam pli kaj pli sin levadis el la ŝaŭmo.

„Al kiu mi venis?“ ŝi demandis, kaj ŝia voĉo sonis kiel la voĉo de la aliaj estaĵoj, tiel spirite, ke nenia tera muziko povas ĝin reprezenti.

„Al la filinoj de l' aero!“ respondis la aliaj. „La virino de l' maro ne havas senmortan animon kaj neniam povas ĝin ricevi, se ĝi ne prosperis al ŝi akiri la amon de homo! De fremda potenco dependas ŝia eterna ekzistado. La filinoj de l' aero ankaŭ ne havas senmortan animon, sed ili povas ĝin akiri al si mem per bonaj faroj. Ni flugas al la varmaj landoj, kie la brulanta spiro de la pesta aero mortigas la homojn; tie ni blovetados malvarmeton. Ni disetendas la bonodoron de la floroj tra l' aero kaj alportas refreŝiĝon kaj sanigon. Se ni en la daŭro de tricent jaroj penadis fari

ĉion bonan kion ni povas, tiam ni ricevas senmortan animon kaj prenas parton en la eterna feliĉo de l' homoj. Vi, mal-feliĉa virineto de l' maro, el la tuta koro ĉiam laboradis al tiu sama celo kiel ni, vi suferis kaj paciencis, vi levigis nun al la mondo de la spiritoj de l' aero, nun vi povas mem akiri al vi post tri centjaroj senmortan animon per bonaj faroj!

La virineto de l' maro levis siajn travideblajn brakojn al la luma suno kaj je l' unua fojo ŝi sentis larmojn. Sur la ŝipo denove regis bruo kaj vivo; ŝi rimarkis kiel la reĝido kun sia bela fianĉino ŝin serĉas, malgaje ili direktis siajn okulojn sur la ondantan ŝaŭmon, kiel se ili sciis, ke ŝi ĵetis sin en la maron. Nevidate ŝi kisis la frunton de la fianĉino, ridetis al la reĝido kaj levis sin kun la aliaj infanoj de la aero al la rozeruga nubo, kiu naĝis en la aero.

„Post tricent jaroj ni tiel transflugetos en la regnon ĉielan!“

„Eĉ pli frue ni povas tien veni!“ diris unu el la spiritoj de l' aero. „Nevidate ni enflugetas en la domojn de la homoj, kie estas infanoj, kaj por ĉiu tago, en kiu ni trovas bonan infanon, kiu faras ĝojon al siaj gepatroj kaj meritas ilian amon, Dio mallongigas al ni nian tempon de provado. La infano ne scias, kiam ni flugas tra la ĉambro, kaj kiam ni el ĝojo pro tiu infano ridetas, tiam niaj tricent jaroj perdas unu jaron, sed se ni vidas malbonkonduktan kaj malbonan infanon, tiam ni devas plori larmojn de malĝojo, kaj ĉiu larmino aldonas al nia tempo de provado unu tagon!“

S. Peterburgo, en Oktobro 1890.

En la No. 8 de l' „Esperantisto“ s-ro R. proponis kelkajn ŝanĝojn kaj plibonigojn. Ne estante tute konsenta je la opinio de S-ro R., mi permesas al mi rimarkigi lin je kelkaj flankoj de liaj proponoj, kiuj laŭ mia penso ne estas tute bonaj. Oni devas rezervi antaŭ ĉio la internacian skribadon de l' vortoj, kiu pleje en la ~~malsamaj~~ lingvoj malpli diferencas ol la elparolado. Tial skribado kiel „xip“ aŭ „jip“, „ar-zento“, „azo“ min memorigas iom je la tempoj de l' Volapük; ĉar kiu rekonos en tiuj vortoj la originalojn? Estas ankaŭ interesa, ke s-ro R. proponas la literon „z“ anst. por „c“ kaj due por „ĝ“. Kun la ŝanĝoj, kiujn proponas s-ro R. en la § 1 Propono I, mi estas entute konsenta. Sed laŭ mi oni povas tre bone skribi la vorton „komenco“ per „z“, kiel en la hispana lingvo „comienzo“; „neĉes“ povas resti (rememoru la italan „neĉessita“); „usi“ kaj „rasi“ estas laŭ mi tute bonaj, mi preferus tamen „pacienzo“ al „pazienzo“. Prenante la literon „x“ por „sh“, s-ro R. sin apogas kvazaŭ je la hispana aŭ portugala lingvo. Tamen tio estas eraro. En la nunaj lingvoj „x“ estas elparolata kiel „ks“, en la antikva hispana kiel „ĥ“ (greka x); sed neniam kiel „ŝ“, kia sono en la hispana nek portugala lingvo tute ne ekzistas. Mi proponus por „ŝ“ skribi ĉiam „sh“ („ship“, „sherz“, „shi“, „shuld“...), kio laŭ mia penso estas pli natura. La „j“ en la nova formo „j“ povas ja resti kune kun la „sh“, ĉar se eĉ iu ne povas distingi en la parolado tiujn du sonojn, ĝi ja ne malhelpas, ĉar ja ne ekzistas vortoj, kiujn oni povus miksi inter si. En multaj vortoj oni povus tre bone meti „s“ anstataŭ „ŝ“, kiel montris s-ro R, kaj ĝi ja kredeble fariĝos kun la tempo. La „ĝ“ devas resti! per neniun manieron oni povas ĝin eligi, ĉar aŭ ni faros la vortojn nerekonoblaj, aŭ ni devas permesi la duoblan elparoladon de „g“ kiel „g“ antaŭ „a“, „o“, „u“ kaj kiel „ĝ“ antaŭ „e“, „i“. Kiel aldono al la alfabeto propono de s-ro R. mi proponus „y“ anstataŭ „j“, tiel ke ni skribus: „sinyoroj“, „yes“, „hoj“ (anst. „hodiaŭ“). Ankaŭ oni povus envenigi la „x“ kaj „q“ por la sencoj, en kiuj ili estas uzataj en ĉiuj lingvoj: „exem-

plo“, „exgeneralo“, „aquo“, „quin“. — Pri la pasiva formo je „ern“ kiun proponas s-ro R., mi trovas, ke ĝi estas tute ne necesa, ĉar oni ja havas du manierojn por ĝin esprimi ekster la ordinara per la „esti“: la unua estas la finiĝo „iĝ“ (trovi — troviĝi, perdi — perdiĝi k. c.); la dua estas la refleksiva pronomo, kiel en la rusa, hispana kaj aliaj lingvoj „la plumo sin perdis“ k. c. Pri la formoj „tiela“, „kiela“ k. c. Vi trovos en la No. 4 paĝo 27 malsupre, ke mi ilin jam antaŭe uzis, sed ke D-ro Zamenhof ilin ŝanĝis en la ordinara formo. Ankaŭ pri la artikolo „lo“ mi antaŭ jam longa tempo korespondadis kun A. Grabowski kaj Geoghegan, kaj ĝi min multe interesis, ke ni du tute malsame venis al la sama rezultato. — En unu punkto mi ne estas tute konvinkita. S-ro R. diras, ke oni devas diri „ĝi estas malvarme“ — „il fait froid“, sed mi pensas, ke oni devas diri „malvarma“, ĉar se ĝi estus tie ĉi adverbo, kial do oni france ne diras „il fait froidement“? — Unu proponon mi volas fari, kiu tamen nenian regulon ŝanĝas, sed estas nur aldono al la jam ekzistantaj. En ĉiuj romanaj lingvoj oni ne tre severe diferencigas en la pronomoj inter la dativo kaj akuzativo: „Je vous aime“ — „je vous donne“ (france); „le digo“ — „le amo“ (hispane); „I love you“ — „I give you“ (angle) k. c. Eĉ en la germana lingvo la neinstruitaj ne diferencigas inter la „mir“ kaj „mich“, „Sie“ kaj „Ihnen“. Tial mi proponus, ke oni poŝu ankaŭ diri, se la senco estas klara, „donu min la libron“ k. c. Tio ĉi estos pli mallonga kaj ne malnatura. Mi petas la legantojn prijuĝi tiujn ĉi proponojn kaj preparoli ilin, por ke tuj post la fondiĝo de l' akademio oni povu jam decidi ilin.

E. de Wahl.

(Tiu ĉi artikolo estis skribita antaŭ ol en la No. 11 estis presita nia artikolo pri la akademio. La redakcio.)

Kjaŝta, 16/28. de Aŭgusto 1890.

Ĉiu bone komprenas, ke la gazetoj estas la plej oportuna kaj la plej fruktoporta rimedo por ĉia vastigado. Tial estus tre bone, ke tiuj el niaj amikoj, kiuj havas eblon, skribu en gazetoj artikolojn pri nia lingvo (pri ĝiaj ecoj, celoj, k. c.) kaj montru, kiel la legantoj povas koniĝi pli vaste kun nia afero. Se presi artikolojn ial estos neeble, oni povas presi anoncojn pri tio sama. Kelkaj lokaj gazetoj havas malmultajn abonantojn, kaj estas tre oportune dissendadi al iliaj abonantoj (almenaŭ al tiuj, kiuj loĝas en tiu urbo, en kiu la gazeto estas eldonata) vortaretojn. En tia okazo estos sufiĉe presi sur la vortaro mem pri tio, kiel oni povas koniĝi kun la afero. Mi pensas, ke tio ĉi alportos grandan utilon al nia afero. Mi jam dissendis al la Jrkutskaj abonantoj de la rusa gazeto „Vostoĉnoje Obozrenie“ 400 vortaretojn.

J. Puĉkovski.

Novajĵoj.

En la fino de Septembro sinjoro Chr. Schmidt havis publikan paroladon pri nia afero en Bamberg. La enhavo kaj la formo de la parolado estis tiaj samaj kiel en la antaŭaj paroladoj de s-ro Schmidt en Nurnbergo kaj Sonnenberg, kaj tial ni ne rakontas pri ili pli vaste. La parolado estis ligita kun debatoj, en kiuj prenis parton la aŭskultantoj mem. Estus tre bone, se la utilaj kaj praktikaj paroladoj de s-ro Schmidt trovus multe da imitantoj.

* * *

En la lasta tempo ni ricevis la sekvantajn gazetojn kun artikoloj pri nia afero: „Sonnenberger Zeitung“ (No. 218), „Würzburger Journal“ (No. 252), „Dorfzeitung“ (No. 220), „Der Stereotypneur“ (No. 10) kaj „Ziarno“. La 4 unuaj gazetoj enhavas korespondojn pri la paroladoj de s-ro Schmidt en Sonnenberg kaj en Bamberg, la lasta — sciigon pri la

Esperanta traduko el Mickiewicz. La nomoj de la aŭtoroj de la korespondoj estas al ni ne konataj; la sciigon en „Ziarno“ donis s-ro A. Starkmann.

Lernolibrojn de nia lingvo por disdonado aŭ dissendado en la lasta tempo venigis: s-ro K. Molgaĉey el Samara -- 35 lernolibrojn (35 No. 1); s-ro N. Halle el S. Peterburgo -- 17 lernolibrojn (8 No. 1 kaj 9 No. 4).

La malkara poŝa lernolibro de nia lingvo por Rusoj, pri kiu ni parolis en la pasinta numero, jam eliris. De tiu ĉi sama verketo nun estas preparata eldono germana, de kiu sinjoro W. H. Trompeter el Schalke jam nun antaŭe. ĉetis 300 ekzemplerojn.

Respondoj al la amikoj.

Al s-ro A. en Ferrara. La formoj „multe da laboro“ kaj „multa laboro“ estas egale bonaj. Egale bonaj ankaŭ estas la esprimoj „mi konas tiom homojn“ kaj „mi konas tiom da homoj“, sed ne bone estus diri „mi konas tiom da homojn“, ĉar en la lasta esprimo la formo „homoj“ dependas ne de la vorto „konas“, sed de la prepozicio „da“, kiu ne postulas la akuzativon. Tamen nomi tian esprimon erara ni ne povas.

Al s-ro K. en Boguĉar. Mi jam respondis al Vi per letero; sed ĉar tiun saman demandon mi ricevis ankaŭ de kelkaj aliaj personoj, mi donos pli detalan respondon tie ĉi. Ŝanĝi la nomon de nia lingvo nun estus tre malutile, ĉar la publiko pensos, ke ĝi estas ia nova lingvo kaj tiel, anstataŭ fortigi nian aferon, ni ĝin nur malfortigus. - La plej granda parto de la publiko estas tute indiferenta por ĉia nova afero, la plej gravan aferon ĝi lasas sen atento, se tiu ĉi afero ne fariĝis ankoraŭ sufiĉe moda, kaj la plej sensencan bagatelon la tuta amaso de l' mondo baldaŭ akceptas, se ĝi nur estas en modo. Tiun ĉi karakteran econ de la publiko ni devas ĉiam bone memori, se ni volas, ke nia afero sukcesu. Se la publika amaso konstante aŭdadus la nomon de nia afero, ĝi ekmemoros ĝin, ĝi kutimos ĝin respekti kiel aferon fortan kaj ĉiam plifortigantan, kaj pli aŭ malpli frue la plej indiferentaj aliĝos al ni; sed rekte kontraŭan rezultaton ni atingos, se ni ofte ŝanĝados la nomon de nia afero, — kŭn ĉiu nova ŝanĝo ni devos denove komenci la batalon kontraŭ la indiferenteco, kaj en la

okuloj de la publiko, kiu longan tempon konas nur la nomojn antaŭ ol ĝi decidas ekkoni la aferojn, — ni restos ĉiam malfortaj. Kian nomon nia afero havos, estas tute egale, ĉar la nomo estas nur sensignifa sono, kondiĉa signo sen graveco interna; sed la nomo estas nia standardo, per kiu ni povas diferencigi amikojn de malamikoj, kaj kiu montras al la publiko la unuecon de niaj diversaj batalantoj en diversaj lokoj; kia ajn la standardo estas, ĝi devas resti ĉie kaj ĉiam tiu sama, por savi nian aferon de mikrado kaj konfuzo. Se ni volus intence elpensi ian nomon por nia lingvo, ni povus sendube trovi multe pli konvenan kaj pli logikan nomon ol „Esperanto“; sed la nomo de nia lingvo ne estas elpensita, kaj jen estas ĝia historio: Eldonante la unuan lernolibron de nia lingvo, mi prenis por mi la pseŭdonimon „Esperanto“; la lingvo mem havis nenian propran nomon kaj estis nomata „la lingvo internacia proponita de Esperanto“. Pro oportuneco oni komencis uzadi la esprimon „lingvo de Esperanto“ (die Esperanto-Sprache); aliaj esprimoj, kiujn kelkaj provis uzadi (ekzemple „la lingvo internacia“, „la internacia“), montris sin neoportunaj kaj ne enfortikiĝis, ĉar ili estis ne bone elparoleblaj, ne memoroblaj por la publiko kaj prezentis nenion difinitan (ĉar sub „lingvo internacia“ oni povas egale bone kompreni la Volapŭkon aŭ aliajn proponitajn projektojn). Baldaŭ montriĝis, ke nur la vorto „Esperanto“ (sole aŭ kun aliaj vortoj) klare diferencigas nian lingvon de aliaj, kaj multaj amikoj komencis baldaŭ en siaj leteroj aŭ artikoloj uzadi simple la solan vorton „Esperanto“, ekzemple „la afero Esperanto“, „skribi en Esperanto“ k. s. Tiel iom post iom ellaboriĝis unuvorta nomo de nia lingvo. Vidante, ke mia komenca pseŭdonimo transiris al la afero mem kaj ke ĝi estas tre oportuna, mi baldaŭ tute ĉesis uzadi mian pseŭdonimon, kaj ĝi restis nur kiel nomo por la afero mem. La nomo „Esperanto“ estas per si mem tute senlogika; sed en sensignifa kondiĉa nomo kial ni bezonas logikon? La plej grava estas tio, ke sub tiu ĉi nomo nia afero estas jam iom konata en la mondo, dum alia nomo estus por la publiko tute nova, kaj la fruktoj, kiujn ni jam gajnis, estus nun perditaj. Estas necese, ke ĝin ĉiam ripetadu unu nomon al la oreloj de la publiko, por ke ĝi kutimu je la nomo kaj respektu la konstantecon de nia afero. „Esperanto“ estas nun nomo de afero kaj ne de persono; „Esperantisto“ nun tute ne signifas „Zamenhofisto“, sed kontraŭe, Zamenhof estas unu el la Esperantistoj.

Anoncoj.

G. Zehmeyer en Nürnberg.

Plej granda komerco de signoj de poŝto.

Ĉiuj kasitaj signoj de poŝto estas aĉetataj kaj ŝanĝataj.

Alle gebrauchten Briefmarken werden gekauft und umgetauscht.

Senpage instruas la lingvon Esperantan Vladimir Vladimiroviĉ de Majnov en S. Peterburgo.

Mielkukoj Nurnbergaj, plej bona speco asortita, estas fersendataj en poŝtaj paketoj je kosto de markoj 3, 5, 10 — al aliaj landoj. Kun la komisio oni sendu samtempe la sumon en signoj de poŝto aŭ per poŝta mandato.

A. Kleinlein,

Strato de l' Reĝo, 53.

La presejo de W. Tümmel en Nürnberg,

de kiu tiu ĉi gazeto estas presata, rekomendas sin por ĉiuj presaj laboroj.

F. Lorenc en Zbislav, Čáslav, Boh., instruas senpage lingvojn slavajn.

Riĉard Geoghegan

en Birkenhead, Anglujo,

instruas senpage la lingvon „Esperanto“ kaj per la lingvo „Esperanto“ ankaŭ la lingvojn anglan, hindan kaj ĉinan.

Aldono al la No. 12 de „La Esperantisto“.

En la komenco de la kurantra kvaronjaro ni petis la abonantojn sendi al ni siajn adresojn, por ke ni povu presi en la fino de la kvaronjaro la adresaron de la abonantoj. Bedaŭrinde ĝis nun nur malmultaj plenumis nian peton. kaj ĉar granda parto de niuj abonantoj ricevas nian gazeton per libroj aŭ per poŝtaj oftegoj kaj iliaj nomoj kaj adresoj estas al ni ne konataj, tial ni ne havas ankoraŭ la eldon vere plenumi nian promeson. Ne volante tamen rompi nian vorton, ni donas tie ĉi almenaŭ la adresaron de tiuj personoj, kiuj sendis sian abonan pagon rekte al ni. Tial ni turnas la atenton de la legantoj: ke la nun presata adresaro prezentas nur parton de la efektiva adresaro. Dank' al la cirkonstanco, ke granda parto de niuj abonantoj ne plenumis ankoraŭ nian peton, ni ne scias re sole la adresojn de tiuj abonantoj, sed ni ne scias ankoraŭ precize eĉ ilian nombron. Por kontentigi la sciamon de niuj amikoj, ni povas nur diri al ili, ke nia gazeto estas presata en la nombro de 600 (sescent) ekzempleroj. En la venonta jaro, kiam la nova ordo iom post iom enfortikiĝos, ni esperas, ke ni povos jam doni al la precizajn kaj plenan adresaron de tiuj niuj abonantoj kaj amikoj.

La nuna fragmenta adresaro estas ankoraŭ frukto de miksaĵo de la malnova ordo kun la nova; tial ĝi enhavas erarojn kaj miksitan ortografion. La venontaj adresaroj estos jam unuformaj kaj regataj. Por la venonta tempo ni petas la abonantojn ne esperantigi sian adreson, sed sendi ĝin en la formo plej komprenela por la loka poŝto (t. e. en ortografija nacia): se ili trovas utile doni ankoraŭ la esperantan formon de sia adreso, ili devas ĝin fari aparte, ekster la adreso originala.

Adresaro de la personoj, kiuj la pagon por la No. 10. 11 kaj 12 sendis rekte al ni:

- J. N. Aaronski en Riĥovo, Saratov.
- Abolenski W. D-ro S. Petersburg, Petersburgskaja Storaĵa Bols. Zel. No. 25. (2 ekzempleroj.)
- Archangielskaja Olga, Aulic-Ara, Syr. Darjinsk obl.
- Arnold J. Henry en Plainfield Conn. U. S. A. Amerika.
- Bancroft u. Comp., 132 Post-Street San Francisco.
- Benkowski, K. Dro., Aulic-Ara, Syr. Darjinsk.
- L. de Brautrou, instruisto, en Marines, Seine — et — Oise, Francujo.
- Bogdanov, M. S. en Sofija, Bulgario.

- Boguslawski, S. A., pastro, Akkerman, Besarabskoj gub., pos. Ŝabo.
- Brzowski, Warschau, rog Zorawoj i Marszalkowskiej.
- Brzowski Viktor, inĝeniero, Muron. gub. Vladimir.
- Clamer Simon, Lehrer, Schalke, Westfalen, Germanujo.
- Crämer, instruisto, en Nürnberg.
- Trackau, P. H., en casa de Ior Stres. Carlos. Due 7 Co. Malaga, Hispanujo.
- Delwig, Barono, en Rovnoje, gub. Samara. R.
- Demogret A. en Paris, Bd. de l'ichey 8. F.
- Dombrowski A. pastro katolika, L'sijuna, gub. Novgoroda.
- G. Dumpert, komercisto, reĝa strato en Nürnberg.
- Eder, Kasimir, instruisto, Offerschwang bei Sonthofen.
- Ender, F. en Czepow ce Unioj'w, gub. Kalisch.
- Fedorov, Sergej Gerasimovich, Tjumen.
- Friedmann, W. D., Semjatyce, Gouv. Grodna.
- Geoghegan, R., Birkenhead (Anglujo, Princes Terr. No. 14).
- Gassner, Oberstabsarzt I. Klasse, Nürnberg.
- Goldberg, Moses, en Narovlja, Gouv. Minsk.
- Grabowski, A., direktoro de fabriko en Ivanovo-Voznesensk (gub. Vlad.) (2 ekzempleroj).

- Gurevich, M. S., Moskau, Pokrovka, dom Sobolera.
- Haller, E., St. Petersburg, Newsky 135 kv 37.
- Halle, Nikolaj, S. Petersburg, Colomo San Gall No. 8.
- Henderson, G. J., London, Red Lion House, Red Lion Court, Fleet Str.
- Hirschhorn, J. G., Tomaszow, Gouv. Piotrkow.
- Hübner, Cornelius, Alexandrowsk, gub. Jekaterinoslaw.
- Janzen, Heinrich, Branerei en Alexandrowsk, gub. Jekaterinoslaw.
- Jäger, Gustav, instruist, Nürnberg.
- Jelinae-Serb., staba kapitano, Kadettenkorps en Omsk, Sibirien.
- Jezercki, M., en Volkoyesk, gub. Grodna.
- Ivanov, D. A., Bogoslovski Zavod, gub. Perm.
- Ivenski, L., Apotheker, Rybinsk, Gouv. Jaroslav.
- Ivenski, P., Apotheker, Kowno.
- Kotzyn, J., Dro., Kowno.
- Krasnikov, Nikolaj, en Tjumen, regna Telegrafo.
- Kugnit Nahum, Teplik, gub. Podolsk.
- Levik, Jul., instruisto de librotendado, gub. Kiev, Belaja-Cerkov.
- Lewis, N., 167, St. Denis St., Montreal, Canada, Nordamerika.
- Lorenc, Fr. W., Zbislav 56, I. P. Caslavy, Böhmen.
- Lepp, Joh., Alexandrowsk, gub. Jekaterinoslaw.
- Lojko, Ivan, Vinno, upravlenie Pol'sskich jel. dor.
- Malen, M., Melitopol, gub. Tavrië.
- Manjkovskaja Evgenia Ivanovna, instruistino. Kremenetz, gub. Volinskaja.
- Martens, Johann (Gasthof Merck), Melitopol, Russland.
- Marijoni Daniele, Dro. en Crema (Italien).
- Meise, Adolf, Postmeister, Schalke, Westfalen, G.
- Naumann, Alex, Vinno, strato Polotzkaja, domo de la grafo Morikoni.

P/ Flokkel, O. (i., inženiero, Bogoslovsk, gub. Ēerm.
 Grohn, J., Warschaŭ, Str. Muranowska No. 34.
 Jaehinowicz, Konnald, Muron, gub. Vladimir.
 Lavite, J., Warschau, Str. Dzikka No. 17.
 Miłowidowa Nadejda, Ivanovo-Voznesensk, Moskovskaja ul., dom Postnikoŭ.
 Nordensvan, M., telegrafestro, Kuopio (Finland).
 Plikover, V., Apotheker, Vejsee, Post Kopeowo, gub. Suwalki.
 Rybkina, Ekaterina, Ivanovo-Voznesensk, dom Postnikovoŭ.
 Silbernik, S., Kowno.
 Silbernik, K., D-ro, Lebedin, gub. Charkov.
 Silbernik, J., 251 E. 31st Street, New-York.
 Tschekmarow, kapitano, Kiev, Petersk. Butišow perukhok.
 Ufamišew Ahmet, Aulie-Āta, Syr-Darjinsk obl.
 Zimmermann, J., D-ro, Chodzenti, Samarkand obl.



Nefedov, Egor Irekopievich, Tjumen.
 Oreskoff, G. P., staciona estro de Telegrafo en Koprivnica, Bulgarijo.
 X. Popof en Ternovo, Bulgarijo.
 Puchkovski, Ijja, Kjahtu, Zabujkalskoj obl. dom (Ĥerepanvoŭ).
 Priggert, Heinrich, Inženiero, Schalko.
 Raschkes, Hosias, en Dinaburg.
 Reiner, Aug., Jelatina, Gouv. Tambow.
 Remele, Friedrich, instruisto en Martinszell, Bayern.
 Richter, komercisto, Nürnberg.
 Riediger, Peter, Chorritza, gub. Jekaterinoslaw.
 Rionitz, D. G., Mount Victoria, Australien.
 Ritz, Hermann, Mount Victoria, Australien.
 Rodriguez, Huertas, Amalenos 12, Malaga.
 Rodionov, Gavril Konst., Tjumen.
 Ryschkov, W. N., Velikie Luki, gub. Pskov.
 Runstedt, A. F., pastro en Wedum Lunnäng Svedujo.
 Rjabinin, Gr., Zmiev gub. (Charkov, Izimnsk ujezda, d. diakona.
 Rajsikin, X., Borispol, gub. Poltava.
 F. H. Warschaŭ, per Adr. Samenhof.
 M. Samenhof, J., Bialystok, gub. Grodna.
 Sivorin, A., en Kiev, Str. Miŭajlovski d. 14.
 Schnader, Jul. (4 Kramer Thare), San Francisco (Cal.)
 Solovjov, Evgenia K., Novomoskovsk, gub. Jekaterinos.
 Sminov, G. J., sublegentanto, Brest-Litovsk.
 Suskernow, Ludwig, Apotheker, Schalko.
 Schatunovski, S. O., Odessa.
 Sjaboszewicz, A. T., Inženieur, Stabscaptain, Taschkent.
 Chranowskaja, Maria, Bjelostok.
 Sprenger, Möbelfabrikant, Nürnberg.
 Satunovski, Gregoro, Kamenee-Podolsk.
 Sokov, Jakov Mich., en Volsk, gub. Saratov.
 Tegner, J. H., en Venersburg, Svedujo Trollhättan.
 Terentieff, V., en S. Petersburg, str. Puschkinskaja No. 10 l. 88.
 Trompeter, J. H., en Schalko, Westfalen (2 ekzempleroj).
 Ulrich, instruisto, Nürnberg.
 Uchalay, Vlad. Aleks., Tjumen.
 Wahl, E., stud. math., S. Petersburg, Koll. des Kaisers Alex. II. 46.
 Wilms, Gerhard, Einlage Poststation Chorritza (gub. Ekaterinoslaw).
 Winkler, Dvo. W., direktoro de reĉla gimnazio en Bitzow (Meklenburg).
 Witkowski, N. A., Cornet im 34. Dragonerregiment — Wyschgorodock. Gouv.
 Wolymien.

Zasmucki, C., Moskau, Mieschjanskaja Str. dom. Pankretow.
 Zimoviev, A., Poltava ul. Sadovaja, sobstv. dom.
 H. v. Zeddelmann, direktoro de privata progimnazio, Walk, Liffland.